

Franz Freiherr von Dingelstedt,

Ĉe la Weser

tradukita de H. W. Funk

Jam ofte sidadis mi tie ĉi
 Kun mia liuto, kantante;
 En valon profunden rigardis mi,
 Pri mond', pri mi mem forgesante.

Kaj sonis muziko majeste en rond',
 Kaj super mi lumis lazuro;
 Malsupre arĝente brilegis la ond'
 De l' Weser kun brua murmuro. —

Kaj kiel el buŝo de amatin'
 Tra l'arboj sonetis kantaĵoj;
 El fundo de l'valo salutis min
 Plej belaj, plej ĉarmaj revaĵoj.

Kaj sonis muziko majeste en rond',
 Kaj super mi lumis lazuro;
 Malsupre arĝente brilegis la ond'
 De l'Weser kun brua murmuro. —

Denove mi sidas nun tie ĉi,
 Sopiron en koro mi tenas;
 Aŭdiĝas ne plu la melodi',
 La revoj neniam revenas.

...

La bildoj, la belaj, nun estas for, —
Ĉielo sen luma ornamo. . .
Adiaŭ, beltempo, iama trezor',
Adiaŭ, ho revoj de l'amo!

*Traduko de la Germana poemo "An der Weser" de FRANZ FREIHERR VON DINGELSTEDT (*1814-06.30 – †1881-05-15) en Esperanton de H. W. Funk.*

Arg-424-1387 (2012-12-13 11:33:32)

Tiu ĉi poem-traduko estas trovebla en http://kantaro.ikso.net/das_deutsche_lied_in_esperanto, pli precize en http://kantaro.ikso.net/cxe_la_vezero. Ĝi aperis unue en la kant-libro "Das deutsche Lied in Esperanto", eldonita en 1921 de Friedrich Pillath.